

Pri la Moderna Cseh-metodo kaj la strukturŝanĝaj ekzercoj.  
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1985.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-153/Radiokasedo-153-B-957-1985-Claude-kaj-Andree-GACOND-Pri-la-Moderna-Cseh-metodo-kaj-la-strukturshanghaj-ekzercoj.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

Dum la somero, kiu ĵs finiĝas, ni havis plian fojon la okazon instrui esperanton al cento da staĝuloj el trideko da malsamaj lingvoj. Tio signifas, ke pertraduka instruado ne eblas. Laŭ la Cseh-tradicio ni instruas helpe de bildoj, kaj absolute ĉion ni klarigas nur en esperanto. Krokodilado ne eblas, ĉar la esperanto-instruisto devus esti eksterordinara poligloto, se li volus sin esprimi en ĉies lingvoj. La lernantaro estas ege heterogena aĝe, kulture kaj eĉ lingve. En la studgrupo troviĝas infanoj, junuloj, plenkreskuloj kaj eĉ tre maljunaj personoj. Kiam oni informiĝas pri la profesioj, oni konstatas, ke same varia estas la situacio: troviĝas intelektuloj kaj metiistoj, personoj ege kleraj kaj aliaj, kiuj ne havis la privilegion studi dum la junaĝo pro plej diversaj kaŭzoj: malriĉa familia medio, milita tempo, elmigro al fremdlando, ktp. Kelkaj konas abundon da lingvoj kaj venas adicii novan idiomon al la listo, dum aliaj estas unulingvuloj, kiuj sopiras al dulingveco. Ne estas tre facile fari harmonian tuton el tiuj efemeraj grupoj, kiuj reformiĝas lundon post lundo por nur unusemajna kurso.

A.- En tiu publiko troviĝas pedagogoj, kiuj jam bone regas esperanton, kaj interesiĝas pri la instruado mem. Ili nelonge restas pasivaj, ĉar dank' al ilia ĉeesto ni povas formi diversajn studrondojn. Momente ĉiuj lernas kune, aliajn momentojn formiĝas unu, du aŭ eĉ tri studrondoj.

Cl.- La du pasintajn sabatojn mi klarigis, ke la gramatikaj klarigoj efektiviĝas en lingvo simpla, kiu evitas la greko-latinan terminologion, kiu pli malhelpas, ol oni ĝenerale kredas. Tamen ni estas tre precizaj en niaj klarigoj kaj analizoj.

A.- Kiam iu formas frazon ĝenerale helpe de bildoj, kiuj alportas ideojn, aŭ rakontas ion, la instruisto lasas lin libere esprimiĝi. Post la rakonto, kiu ĝenerale estas mallonga, alvenas tre karakteriza instru-fazo. La instruisto rediras la ĵus aŭditajn frazojn korektante la mankojn, kaj li lasas la tempon, frazon post frazo, al korusa ripeto de la tuto. La parolinto havas tiel la eblon rediri sian rakonton en pli korekta lingvo.

Cl.- Unu el la ĵusaj frazoj tutcerte havas karakterizaĵon, kiu povas esti la bazo de tuta leciono aŭ de vico da fraztransformoj. Ni donu ekzemplon pri kelkaj el tiuj strukturŝanĝaj ekzercoj, kiuj estas riĉigaj por ĉiuj, por la komencantoj kaj por la progresantoj.

A.- Staĝulo ekzemple diris: Mi iris en la urbon, ĉar mia fotaparato ne bone funkcias. Fotvendisto riparigis ĝin.

Cl.- La korusa ripeto jam alportas transformon. Ekzemple:

A.- Georgo diris, ke li iris en la urbon, ĉar lia fotaparato ne bone funkciis. Georgo riparigis ĝin ĉe fotvendisto.

Cl.- Aliaj rakontmanieroj estas troveblaj. La instruisto trovigu ilin frazeron post frazeroj. Li diras: transformu "li iris en la urbon".

A.- Li iris urben. Li veturis al la urbo. Li veturis urben. Ktp.

Cl.- Transformu: "Lia fotaparato ne bone funkciis."

A.- La fotaparato de Georgo malbone funkciis. La Georga fotilo fuŝiĝis. Difektiĝis la fotilo de Georgo. Ktp.

Cl.- Ĉiun transformekzemplon korse ripetas ĉiuj klasanoj. La lertuloj imagas novajn transformojn, la komencantoj lertiĝas ripetante ilin. Ĉiam la instruisto gvidas tiujn ekzercojn ĉu per propono de netrovitaj transformoj, ĉu per ripeto de propono en pli korekta formo.

A.- Tiuj ripetekzercoj neniel estas tedaj. Ili lertigas ĉiujn kaj ebligas konstantan parolan uzon de la lingvo.

Cl.- Sed de tempo al tempo gramatikaj klarigoj estas necesaj. Jen kiel reduktiĝas la necesaj analizaj fakvortoj. Unue oni malkovras la verbon kaj la subjekton, kaj poste oni kontrolas, ĉu la nesubjektoj posedas la nesubjektajn karakterizilojn: ĉu la markon -N, ĉu ligvorton, ĉu la markon -E.

A.- Ĉimaten la libroj ne bone vendiĝis pro manko de reklamo.

Cl.- Verbo: vendiĝis, subjekto: la libroj. Nesubjektoj: ĉimaten, ne bone, pro manko de reklamo.

A.- Oni povas provi ŝanĝi la nesubjektajn indikilojn: Ĉimaten, La hodiaŭan matenon, Je la hodiaŭa mateno.

Cl.- La instruisto petas, ke la subjekto de 'libroj' fariĝu nesubjekto.

A.- Respondo povas esti: Ĉimaten oni ne bone vendis la librojn pro manko de reklamo.

Cl.- La instruisto petas, ke 'pro manko de reklamo' fariĝu la subjekto.

A.- Manko de reklamo malbone vendigis la librojn ĉimaten.

Cl.- Aliajn solvojn oni povas trovi. Antaŭ ĉio gravas, ke la staĝuloj ekkonsciu, ke la plej simplaj frazoj, kiel tiu, kiun ni plurmaniere transformis, povas esti aliigitaj. La komencantoj ĝojas proponi tre simplajn frazojn, kiujn la progresantoj pli kaj pli entuziasme variigas.

A. - Tri bildoj povas naski preskaŭ senliman nombron da frazoj:  
Ni prenu kiel ekzemplon la bildojn de arbaro, fungoj kaj sciuro, kiujn la instruisto fiksas al la flaneltabulo. Jen frazproponoj:

Cl.- En arbaro mi admiris sciuron kaj kolektis fungojn. Sciuroj manĝas fungojn en la arbaro. Promenado en arbaro trovigas al ni fungojn kaj renkontigas nin kun sciuro. Sciuro observas promenanton, kiu kolektas fungojn. En arbaro oni renkontas sciurojn kaj kolektas fungojn. En arbaro renkontiĝas sciuroj kaj kolektiĝas fungoj. Kaj tiel plu, ktp.

A.- Ĉiu alportas siajn frazojn laŭ sia lingvonivelo. Ju pli lertiĝas la staĝuloj, des pli kreivaj ili fariĝas okaze de tiuj ekzercoj.

Cl.- Kaj ĉiuj samtempe riĉigas sian vortprovizon kaj pli kaj pli firmigas siajn gramatikajn konojn. Neniam tedo interrompmas tiujn paroligajn ekzercojn, kiam la instruisto estas kompetenta gvidanto. Plurajn tiajn paroligajn staĝojn devas ĝenerale sekvi instruistoj, antaŭ ol povi praktiki kun efiko la Modernan Cseh-Metodon, kiun ni provis prezenti al vi dum tri sinsekvaj sabatoj kaj kiun ni tre volonte malkovrigos al vi en La Chaux-de-Fonds mem, okaze de esperanto-stago.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond diras al vi: ĝis reaŭdo!